Projekto NABOUBA
Informoj por eblaj patronoj kaj subtenantoj de afrikaj infanoj

Orfejo

La orfejo **Nabouba** troviĝas 2 kilometrojn de la urbo Lokossa en Benino. Ĝi estis fondita la **20an de majo 2000** de **Félicien MICHIFAN,** la nuna direktoro.

Ni havas liston kun entute **80 infanoj** inter 2 kaj 15 jaroj, por kiuj ni serĉas patronojn kaj subtenantojn. La listo estis kreita surbaze de dokumentoj kontrolitaj de „Centre de Promotion Sociale“. En la orfejo estas instruata Esperanto (post komenciĝo de la nova lerneja jaro la instruado momente ne okazas pro okupo de la kutima instruisto en alia loko, sed ni serĉas novan instruiston. Instruado rekomenciĝos verŝajne februare 2009. Intertempe la pli aĝaj infanoj studas memstare).

Prioritatoj kaj celoj de patronado/subteno

Ni serĉas personojn, kiuj regule **subtenus konkretan infanon** en la orfejo dum pluraj jaroj per **15 EUR monate** (pagendaj kune po 6 monatoj), do kiu iĝus patronoj de infanoj. La unua prioritato estas subteni infanojn, kiuj perdis ambaŭ gepatrojn, kaj poste duonorfojn. Infanoj kutime forlasas la orfejon plej laste, kiam ili atingas 18 jarojn.

Eblas ankaŭ subteni plurajn infanojn kaj ankaŭ eblas donaci monon por la ĝenerala uzo de la orfejo (ekzemple unufoje pli grandan sumon, aŭ aldoni iom da mono al la jam pagata regula kontribuo, aŭ pagi regule por ĝenerala uzo de la orfejo).

Ni subtenas **egalecon de knaboj kaj knabinoj**, do sekso de infanoj ne ludas prioritatan rolon – male, ni strebos je ekvilibro en tiu senco.

Celo de subteno: **lernejaj elspezoj, vestaĵoj kaj subteno de bona sanstato**; por la tuta orfejo: **renovigo de nunaj dormĉambroj**, **estonte konstruaĵo de nova loĝejo kaj akvoputo**.

Organiza flanko

En Eŭropo kunordigas la projekton **Vlaďka Chvátalová**. Helpe de aliaj informantoj ŝi serĉas patronojn kaj subtenantojn por infanoj, tenas kontaktojn kun ili, kolektas kontribuojn kaj sendas ilin al la orfejo. Ŝi estas la ligo inter la patronoj kaj subtenantoj kaj la orfejo.

La persono, kiu ŝatus subteni infano(j)n aŭ iĝi patrono de iu infano, resendas/redonas alkroĉitan **formularon** al Vlaďka aŭ informas ŝin per mesaĝo pri sia intenco subteni la projekton. La formularo ne estas kontrakto, tamen ĝi montras seriozan intereson pri la projekto. Surbaze de la formularo kaj la listo de (duon)orfoj estas interkonsentita la nomo de la infano, kiun la ebla donaconto ŝatus subteni. Se eblas, tiu subteno (patronado) daŭros ĝis la momento, kiam la infano forlasas la orfejon. Se pro iu neantaŭvidita kialo la patrono ne plu povas sendi monon, ni strebos trovi anstataŭanton. Bonvolu tamen pripensi, ke via helpo ege gravas kaj ĉiu infano ege dependas de ĝi.

Eblas subskribi **interkonsenton en la franca aŭ Esperanto**. La patrono ĝiras aŭ persone transdonas monon por la **periodo januaro-junio aŭ julio-decembro** al Vlaďka, kiu ĝiras monon sume al Benino. Ŝi mem kovras ĉiujn sendokostojn kaj sekve ĉiu donacita mono atingas la infanojn. **Neniu mono estas perdita per administrado**. Post la transdono de la mono estos subskribita konfirmilo pri ricevo de la mono, kiu estos transdonita al la patrono.

Ankaŭ unufojaj subtenantoj aŭ regulaj subtenantoj, kiuj donacos monon por ĝenerala uzo de la orfejo, ricevos konfirmon pri la ricevo de mono.

Ĉiuj patronoj kaj subtenantoj ricevos **regulajn raportojn** pri uzado de la kontribuoj. Se infanoj mem kapablas skribi, eblas korespondi kun ili france kaj kun kelkaj ankaŭ en Esperanto.

La elspezoj estas kontrolataj helpe de lokaj personoj. La direktoro sendas al Vlaďka kopiojn de ĉiuj elspezoj ligitaj al la donacita mono.

Informoj pri patronoj/subtenantoj

Informojn pri patronoj/subtenantoj (do pri retadresoj, poŝtaj adresoj, telefonnumeroj ktp.) kolektas Vlaďka, kiu NE transdonas ilin al la afrikaj partneroj. Se iu volas rekte kontakti la orfejon, eblas tion fari, alikaze personaj informoj ne estas transdonataj.

Retejo

Dum vintro 2008/2009 ni ŝatus starigi nian propran retejon, kie estonte aperus aktualaj informoj pri la orfejo, ekzemple regulaj raportoj kaj fotoj. Ni serĉas kunlaborantojn, kiuj havas spertojn pri kreado de retpaĝoj.

Versio januaro 2009

Vlaďka Chvátalová
sciuro@seznam.cz
Tomberg 26, 1200 Bruxelles, Belgio

Kontonumero ĉe ING (Rond-Point R. Schuman 8, 1040 Bruselo)
Konto de Vladimíra Chvátalová
IBAN:BE46363012056736
BIC: BBRUBEBB